

Sándor Szathmári - lia vivo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 772, 1978.07.27 & 29

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La fako "Esperanto - lingvo kaj literaturo" de la Budapeŝta Universitato Eötvös Lóránd ĵus eldonis duan volumon en la kolekto "Esperantologiaj Kajeroj" por marki sian dekjaran jubileon. En tiu ĉi dokumentaro ni trovis interesan eseon de Mária Bereczki, studentino de d-ro István Szerdahelyi, pri la verkisto Sándor Szathmári kaj lia fama romano "Vojaĝo al Kazohinio". Jen laŭ tiu ĉi studo sciigoj pri la vivo de Sándor Szathmári:

A.- "Sándor Szathmári naskiĝis en la jaro 1897, en la hungara urbeto Gyula. Lia patro estis oficisto, kiu ofte translokiĝis, tial Sándor vizitis la lernejon unue en Alsókubin (nun en Ĉeĥoslovakio), poste en Lugos (nun en Rumanio) kaj fine en Budapeŝto. En tiu ĉi urbo Sándor Szathmári studis en la mekanika fakultato de la Teknika Universitato. Post akiro de diplomo li fariĝis inĝeniero en la fabriko "MAVAG", kie li okupiĝis pri maŝinprojekto, ĝis kiam li fariĝis pensiulo.

Cl.- Dum la universitataj jaroj kaj ankaŭ poste Szathmári multe interesiĝis pri sociologiaj kaj natursciencaj demandoj. Dum siaj infanaĝaj migradoj li povis observi la naciajn antagonismojn, kiujn li neniam povis kompreni.

A.- Pri Esperanto li ekinteresiĝis, kiam li estis 12-jara, sed fakte nur 8 jarojn poste li komencis serioze ellerni la lingvon tra legante la verkon de Leo Tolstoj: "Tri Rakontoj". Estas pere de tiu ĉi legado, ke li bone alproprigis la zamenhofan lingvon.

Cl.- La suferoj de la mondo dum la unua mondmilito malesperigis tiun ĉi internaciiston, kaj post la milito, kiel granda parto de la hungara intelektularo, Szathmári vigle esperis, ke la ĵus travivitaj teruroj kondukos la homaron al interpopola kunlaboro.

A.- La monda ekonomia krizo kaj la disvastiĝo de faŝismo montris al li, ke lia espero estis nura iluzio. Li ĉiam pli videble konvinkiĝis, ke la homo havas internan difekton, kiu malebligas lin atingi perfektan vivon. Epiloge al "Maŝinmondo" Sándor Szathmári agnoskas, ke lia pesimismo trovis nutron en la verkoj de Madách kaj Swift:

Cl.- "En mia animo ĉiam pli lumiĝis la praveco de la verko de Madách: La Tragedio de l'Homo, kies rezulto estas, ke la homo senĉese luktas kaj esperas pli bonan estontecon, kiu tamen neniam alvenas. La homaro ĉiam suferigos sin mem. Same lumiĝis al mi grandioza idea senco de Swift: la homa animo havas internan, strukturan difekton, kio malebligas al ni vivi perfektan vivon."

A.- Mária Bereczki mencias la jarojn 1932 kaj 1934 kiel komencon de la verkista kariero de Sándor Szathmári. Li komencis formuli sian penson en trilogio titolita "Vane". Ni citas: "La tri partoj okazis laŭvice en la pasinto, en la estonto kaj en la estonto. La rolludantoj estis la samaj homoj, la samaj tipoj, nur en aliaj medioj, konvenaj al la epokoj. Iliaj sortoj estis ankaŭ la samaj. La socio mortigas la entuziasmon de la heroo, kaj la vivo daŭras plu, la mondo rotacias plu laŭ la eterna monotona sameco."

Cl.- Ĉi tiu trilogio ne aperis, sed en 1935 Szathmári komencis verki novan romanon: "Vojaĝo al Kazohinio", kiu estas Gulivera aventur-romano. Li tuj komencis verki en Esperanto, ĉar li

opiniis, ke la ĝenerala humana tendenco antaŭdestinis la libron al Esperanta eldono. Tamen la libro unue aperis en hungara versio. Ni refoje citu la studentinon Mária Bereczki:

A.- "La elstara satira romano estis preta en Esperanto kaj parte ankaŭ hungare jam en 1938. La eldono "Literatura Mondo" en Budapeŝto akceptis ĝin, kaj Kálmán Kalocsay reviziis kaj korektis la tekston laŭ lingva vidpunkto. La disvastiĝo de 1' hitlerismo malebligis la pluan ekziston de la menciita eldono, tial en 1939 iu amiko elmigranta al Francio kunportis la manuskripton al SAT, kiu jam tiutempe inklinitis eldoni ĝin. Sed la milito renversis ĉiujn planojn. Szathmári serĉis eblecen por hungarlingva eldono. Pluraj eldonistoj interesiĝis, sed li devis submeti la manuskripton al la cenzuro. Fine, la libro aperis en kripligita formo en 1941, en 3500 ekzempleroj. Post la milito aperis ankoraŭ tri eldonoj. La dua, en 1946, enhavis plurajn novajn ĉapitrojn; la tria aperis en 1957, kaj la kvara en 1972. SAT eldonis la romanon en 1958, en Parizo, ĝi estis la originala, Esperanta verko."

Cl.- Mária Bereczki atentigas nin, ke fakte nur ekde 1956 la aŭtoro de "Vojaĝo al Kazohinio" rekomencis verki. Kaj pri lia verkaro ŝi diras:

A.- "La duono de lia verkaro estas en Esperanto. Jam antaŭe li publikigis plurajn novelojn en "Belarto", "Nica Literatura Revuo", "Norda Prismo", "Sennacieca Revuo", ktp. Post 1956 en la Esperantaj literaturaj revuoj unu post la alia aperas liaj noveloj, rakontoj, recenzoj, rememoroj kaj artikoloj. Ekde 1965 li estis ĉefkunlaboranto de "Hungara Vivo", kie aperis pluraj liaj beletristikaj tradukaĵoj, unuavice el la verkoj de Karinthy."

Cl.- Sándor Szathmári skribis pri Karinthy: "Mi rigardas lin mia spirita, anima patro. Li estis la unusola hungara verkisto, kiu ne rakontis, sed prezentis kaj kritikis la realaĵon. Li estis la unua homo, kiu tute komprenis Kazohinion".

A.- Estas interese scii, ke en 1958 Sándor Szathmári tradukis el Esperanto hungaren la romanon de la itallingva svizo Cezaro Rossetti: "Kredu min Sinjorino".

Cl.- En 1964 aperis lia originala novelaro "Maŝinmondo"; hungare tiu ĉi ĉefverko aperis nur en 1972. Du jarojn poste la Esperanta kaj hungara verkisto mortis, tio ekzakte la 27-an de septembro 1974.

A.- Ni esperas, ke Esperanto-eldonisto baldaŭ aperigos kompletan verkaron de Sándor Szathmári, seeble kun enkonduka studo, kiu situigu ĝin en la universalan literaturon. Tiam eble la esperantistaro malkovros, ke granda pensulo sin esprimis en Esperanto. Venontan semajnon ni provos situigi la verkaron de Szathmári en la hungara kaj Esperanta literaturoj, tio dank' al la studo de Mária Bereczki.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gracond. Ĝis reaŭdo!